

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE LA BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

Rekomendita de la Ministerio de publika instruado per cirkulero № 5677 de 3. II. 1938

NUMERO DEDIĈITA AL VARNA

(Vidu sur paĝo 2 de la kovrilo la
kondiĉojn pri la konkurso).

KONKURSO

La banloka Direkcio ĉe la komunumo de la Bulgara urbo Varna invitas vin partopreni en ĝia konkurso por senpaga restado en Varna kaj multaj aliaj premioj.

Reguloj de la konkurso:

1. La jena numero de „Bulgara Esperantisto“ enhavas kvar artikolojn pri la urbo Varna. Vi estas petata: traduki en vian nacian lingvon tiujn ĉi artikolojn, aŭ nur unu aŭ fragmentojn de ili, kaj publikigi tiujn ĉi tradukojn en kiom eble pli multaj el viaj nacilingvaj ĵurnaloj, gazetoj, kaj diversaj periodaĵoj.
2. Vi rajtas traduki la tutan artikolon aŭ nur parton de ĝi, laŭ via propra bontrovo.
3. La tradukinto estas petata (se eble) sub la titolo de la publikigita artikolo noti, ke ĝi estas tradukita el la Esperanto-gazeto „Bulgara Esperantisto“.
4. La tradukoj devas aperi ĝis 15-a de oktobro 1938.
5. Liston de la tradukitaj artikoloj kaj de la gazetoj, en kiuj ĝi aparis, bonvolu sendi al: *Banloka Direkcio — Varna. Bulgarujo*. Lasta limtempo — fino de Februaro 1939.
6. La listo devas enhavi: Titolon de la gazeto, titolon de la artikoloj, daton, nomon de la urbo, kie aperas la gazeto, lingvon kaj eldonkvanton.
7. Eldonkvanton de la gazeto aldonu, se tio estas ebla. Sed ni petas vin pri tio. Ĉe la distribuado de la premio tio ne estos konsiderata.

8. Kune kun la listo sendu al ni gazeteltranĉaĵojn de tiuj ĉi gazetoj. Sur la gazetaltranĉaĵoj bonvolu noti la titolon kaj lokon de la gazeto.

9. La ricevitaj gazeteltranĉaĵoj kaj listoj estos ekzamenitaj de speciala komisiono, konsistanta el 4 membroj: 2 reprezentantoj de la komunumo de Varna kaj 2 reprezentantoj de la Bulgara Esperantista Asocio. Krom tiuj kvar personoj alestos ankaŭ du aliaj: unu ĵurnalist-eksperto kaj unu el la profesoroj de la Komerca Akademio en Varna.

PREMIOJ:

Por la plej bonaj rezultoj la Banloka Direkcio donos la sekvantajn 6 premiojn:

una premio — *Trisemajna* senpaga restado en S-ta Konstantin, la plej bela somerrestedejo en la ĉirkaŭaĵo de Varna.

dua premio — la sama, sed por *du* semajnoj.

tria premio — bluzoj kaj ĉemizoj kun belegaj bulgaraj brodaĵoj.

kvara premio — luksaj albumoj kun vidaĵoj de Varna kaj ĝiaj ĉirkaŭaĵoj.


kvina premio — boteletoj da bulgara rozoleo.

sesa premio — libroj (romanoj kaj sciencia literaturo) de bulgaraj aŭtoroj en Esperantaj, francaj kaj germanaj tradukoj, laŭ elekto de la partoprenantoj en la konkurso.

На работа за отчитане на членоветѣ

Преди нѣколко месеци отъ страницѣ на нашето списание „В. Esperantisto“ отправихме къмъ всички съдействици покана за събиране на 1000 предплатили абоната. Сега вече можемъ да обявимъ, че цифрата 1000 предплатили абонати е достигната, и до конгреса тѣ ще станатъ още повече. Ц. К. на Б. Е. С., окураженъ отъ резултатитѣ на тази кампания, опредѣ-

ля нова такава: за отчитане на членоветѣ и записване нови такива! Като главенъ агитационенъ периодъ се опредѣля седмицата 1 до 7 юлий вкл. Презъ тази седмица, както и въ днитѣ преди и следъ нея, всички трѣбва да напрегнемъ сили, за да дадемъ на Б. Е. Сюзъ най-малко 500 напълно отчетени члена.



Panoramo de la banejoj en Varna

VARNA

De Nigra maro la reĝino
 invitas vin dum la somer',
 al zorgoj pezaj meti finon, —
 forgesi pri la ter-sufer'...

Al vi la pompa strat' proponas
 promenon al la Margarden',
 muziko dolĉe al vi sonas,
 vin tiras ia sorĉ-faden'.

En ĝojo bruas ora plaĝo,
 facilajn ondojn rulas mar',
 la suno montras brulvizaĝon,
 jen ludoj, krioj, gajular'.

Boat' luliĝas kun amparo,
 jen naĝas knabo kaj knabin'.
 Ho, ne hezitu, mia kara,
 sed iru, refreŝigu vin!

Vespero freŝa, nokto ĉarma,
 brilantaj steloj sur ĉiel'...
 O vi, belega mia Varna,
 de Nigra maro la juvel'!

De Nigra maro la reĝino
 invitas vin dum la somer',
 al zorgoj pezaj meti finon, —
 forgesi pri la ter-sufer'.

Nu, venu, iru al la maro!
 He, boatisto, remu plu!
 La luno el ĉiela klaro
 lumigas per arĝenta lum'.

La akvo dormas tre trankvile,
 kvieta estas mardezert',
 aŭdiĝas nur la klak' remila;
 vin ebriigas la vesper'.

Ekskurse vi dimanĉe iru
 al interesa ĉirkaŭlok',
 por ĝui belan panoramon,
 por miri pri pentrinda rok'.

Ne timu vi pro nekompreneo
 de patra lingvo de l' bulgar',
 ĉar tie staras sur posteno
 „Albatra“ esperantistar'.

Sufiĉe armu vin per mono
 kaj sorĉa Esperanto vi, —
 regalas vin somersezone
 per ĝoj' en gaja kompani'.

VARNA

Ĉirkaŭ 570 jaroj a. Kr., sur unu el la plej belaj golfoj de la Nigra maro, Miletaj komercistoj fondis la urbon Odesus.

Pro sia favora situo, la urbo rapide kreskis kaj en mallonga tempo ĝi fariĝis unuagrada haveno de Pontus Euxinus.

La urbo estis bone konstruita, kun akvokonduko kaj ĉirkaŭita per dikaj fortikaj muroj, kiuj ŝirmis ĝin kontraŭ la atakoj de diversaj barbaraj gentoj el Nordo. Ĝiaj loĝantoj havis viglajn komercajn rilatojn kun siaj najbaroj, kun Sirio k. a. landoj, dank' al kio la urbo pliriĉiĝis kaj prosperadis. En prospera stato estis ankaŭ la artoj: temploj estis konstruataj en honoro de dioj, multaj statuoj ornamis la stratojn kaj la domojn de riĉaj Odesus'anoj.

De tiu ĉi epoko de ekonomia prospero kaj de progreso en kulturo kaj artoj, estas konservitaj multaj restaĵoj en la riĉa arĥeologia muzeo de Varna.

Depost la 595 jaro p. Kr., laŭ ĉiuj trovitaj manuskriptoj kaj monumentoj, Odesus portas jam la nomon Varna. Pri la deveno de tiu ĉi nomo ekzistas kelkaj hipotezoj, sed mankas aŭtentikaj faktoj por akcepti ian el ili.

Sur la loko de la antikva Odesus hodiaŭ staras la urbo Varna — unu el la unuarangaj havenoj kaj la plej bela banloko sur la bordo de la Nigra maro.

Ĝia geografia pozico estas 27° 45' oriente de Greenwich kaj 43° 12' norde de

la ekvatoro. La urbo kuŝas sur ebenaĵo 25—40 metrojn super la nivelo de la maro.

Nuntempe Varna havas pli ol 70,000 loĝantojn kaj, laŭ sia grandeco, estas la tria urbo en Bulgarujo.

Bone konstruita kun elektra lumigado, fluanta akvo, kanaloj, kun larĝaj, bone pavimitaj stratoj, kun belaj parkoj, ĝardenoj kaj konstruaĵoj, Varna iom post iom ricevas fizionomion de moderna okcidenteŭropa urbo.

Varna estas la dua kultur-centro de la bulgara regno. En ĝi troviĝas: Supera Komerca Akademio, la solaj en la lando Reĝaj Mara Muzeo kaj Akvario, Arĥeologia Muzeo — dua post la ŝtata en Sofio, Nacia Teatro kun moderna scenejo kaj ĉiuj nuntempaj aranĝoj, Biblioteko kun publika legejo, Komerca Mezlernejo, gimnazioj por knaboj kaj por knabinoj, Regiona Kontpalaco, Regiona Juĝejo, Regiona Impostoficejo, Havendirekcio, unuagrada doganejo kaj fervoja stacio, Komerc-industria Ĉambro, Varo-borso, unuaklasoj filioj de la Bulgara Nacia kaj Bulgara Agrikultura Bankoj, multaj privataj bankoj k. a. publikaj institucioj.

Varna estas la somera restadejo de la bulgara reĝa familio kaj tron-urbo de la Varna-Preslava episkopo.

Per fervojlinioj kaj ŝoseoj la urbo estas ligita kun la interno de la lando kaj, per sia haveno kaj la maro — kun ĉiuj transmaraj landoj.

Sudokcidente de la urbo troviĝas la grandega lago de Varna, kiu, per kanalo, farita en la jaro 1906, estas ligita kun la libera maro.

Trad. K. D.



Parto de la strando, kun la terasoj



La strando

VARNA

kiel ban- kaj kuracloko

Grava komerca havenurbo kaj industria centro, Varna, ĝis la mondmilito, havis viglan komercon kaj grandan ekonomian prosperon. Tamen, post la malbonanĉaj militoj, la urbo perdis sian hinterlandon — la fruktodonan regionon Dobruĝa — kaj ĝia komerco spertis grandan baton. Tiam oni komencis atenti la klimatajn, geografiajn kaj naturajn belaĵojn de la urbo, kiuj estas treege favoraj por ĝia disvolviĝo kiel ban- kaj kuracloko. Kaj ni estas atestantoj de la rapida disvolviĝo de Varna en tiu ĉi rilato.

En la jaro 1926 la urbo estis oficiale proklamita kiel banloko, kaj de tiam komenciĝas ĝia prospero kaj populareco kiel la plej bela mara banloko sur la bordo de la Nigra Maro. La klimato de Varna estas mara-kontinenta. La ŝanĝoj en la temperaturo de aero kaj marakvo estas malfortaj, tial ĉi tie la somera varmeco estas tolerebla kaj la noktoj estas agrable malvarmetaj. La aero, dank' al la proksimeco de la maro, estas pura de mikroboj kaj estas saturita de

ozono kaj de vaporoj de jodo. Ĉiuj ĉi tiuj favoraj cirkonstancoj, kiuj estas specifaj por Varna, kreis ĝian grandan popularecon ne nur kiel somerrestadejo, sed ankaŭ kiel ban- kaj kuracloko, kie per konvena uzado de la malvarmaj kaj varmaj marbanoj, kiel ankaŭ de la aer-, sun- kaj sablobanoj — oni povas sukcese kuraci la sekvantajn malsanojn: mensa kaj korpa konsumiĝo, anemio, ĉiaspecaj malnovaj pleŭritoj; osta, artika kaj haŭta tuberkulozo; peritonito, neŭralgio, neŭrastenio, histerio, hipohondrio, melankolio, reŭmatismo, iŝiaso, neregula asimilado, podagro, skrofolo ktp.

La vasta strando el pura etgrajna sablo estas unu el la plej bonaj sur la bordo de la Nigra Maro. La fundo de la maro estas ebena kaj pura de rokoj.

La marbanejoj, konstruitaj sur la strando mem, estas belegaj modernaj konstruaĵoj, provizitaj per ĉia moderna komforto kaj oportuneco por amuzoj kaj plezuroj sur la strando kaj ankaŭ en la maro: akva sporto, falglitejo, maraj glitveturiloj ktp.

Senpere super la banejo etendiĝas vastaj terasoj kun belaj panoramoj de la maro kaj de la strando. Ĉi tie troviĝas bonegaj bufedoj, dank' al kiuj la bangastoj povas resti longajn horojn sur la strando, sen neceseco forlasi ĝin por tag- aŭ matenmanĝo.

Speciale instruita kaj elprovita savobrigado senĉese zorgas pri la gastoj, kiuj banas sin en la maro.

Apud la marbanejoj, sur la bordo mem, troviĝas la Marĝardeno, kiu, laŭ siaj dimensioj, belega situo kaj aranĝo, estas vera perlo de Varna kaj estas unu el la plej agrablaj lokoj por meditado kaj ripozo de la bangastoj.

Varna havas bonegajn hotelojn, vilaojn kaj komfortajn privatajn loĝejojn. Ekzistas restoracioj kun bulgara, ĉeĥa, viena kaj aliaj kuirejoj. Oni ricevas purajn, malkarajn, bongustajn manĝojn kaj belegajn bulgarajn vinojn.

La bangastoj ne povas trovi en Varna luksegon, sed havos ĉian komforton, purecon, belegan naturon, abundecon de fruktoj kaj legomoj, — ĉe longa kaj serena somersezo. Sendepende de la amuzoj kaj plezuroj sur la strando kaj en la maro, Varna proponas al siaj bangastoj belegajn veneciajn vesperojn, promenadojn sur la maro en feeria lumigado, noktajn banojn, dancejojn kaj aliaj amuziĝojn.

Ĉiujare dum la bansezono oni aranĝas en Varna grandajn muzikfestojn, en kiuj partoprenas eminentaj muzikistoj kaj artistoj de la lando kaj ankaŭ tiaj el eksterlando, kiuj venis por somerrestado. La ŝtata radiostacio en la urbo aranĝas koncertojn kaj vesperojn, dediĉitajn sinsekve al la landoj, de kiuj venas la plimulto de la eksterlandaj bangastoj.

Ĉiujare, sur la strando estas organizata elekto de „Reĝino de la strando“, „la plej bela piĝamo“, „la plej bela infano“ k. s.

En la fino de aŭgusto — komenco de septembro en Varna estas organizata granda kongreso de vilaĝanoj el la tuta regiono de Varna, kun reprezentantoj de ĉiuj aliaj regionoj en la lando. Dum tiu ĉi kongreso, kiu estas unika laŭ sia speco en Bulgarujo, oni elmontras la belegajn bulgarajn naciajn kostumojn, bulgarajn naciajn kutimojn kaj morojn. Tiu ĉi kongreso donas al la eksterlandaj bangastoj la eblecon vidi la bulgaran vilaĝon kaj ĝian laboron — kiu estas la fundamento de la bulgara nacia ekonomio.

Varna estas unika somerrestadejo, kie ekzistas ĉiuj favoraj kondiĉoj por kombini la markuracadon kun la kuracado per vinberoj.

De la fino de aŭgusto, la urbo proponas al siaj gastoj, abunde kaj malmultekoste, la plej bonkvalitajn dolĉajn vinberojn de siaj propraj vinberĝardenoj. La bulgaraj vinberoj, pro siaj bonaj kvalitoj, gusto kaj dolĉeco, estas konataj ankaŭ eksterlande. Ili kuracas multajn malsanojn kaj samtempe estas bonega nutraĵo. Post sistema kurso de kuracado per vinberoj, la sango puriĝas, la viv-energio pligrandiĝas rimarkeble kaj oni sentas sin rejunigita.

La aŭtuno en Varna estas serena kaj agrabla. La suno daŭrigas sendi siajn mildajn radiojn kaj la banado en la maro ankoraŭ estas agrabla kaj utila.

La belegaj aŭtunaj tagoj, pasigitaj en la mirinda naturo de Varna, trankviligas la animon kaj vi forlasas la urbon kun bedaŭro, tamen refreŝigita kaj kun rimarkeble pligrandigita energio.

Tradukis: I. S.

Bona esperantisto ĉiam portas insignon, abonas kaj legas gazetojn, aĉetas librojn kaj konstante perfektigas sin en la lingvo.

VIDINDAĴOJ KAJ ĈIRKAŬAĴOJ DE V A R N A

Varna estas urbo de historiaj vindindaĵoj. La ĉirkaŭaĵoj de la urbo kaŝas en si multajn historiajn valoraĵojn, dum aliaj estas konservataj en la urbo mem, kiel ekzemple „La turo de Asparuh“, kun siaj subteraj galerioj k. a. La sci-volema bangasto povas en ĉiu tempo viziti la bonegan arĥeologian muzeon, kiu troviĝas en la gimnazio por knabinoj. Tie, per la multaj antikvaj objektoj kaj valoraj manuskriptoj, oni povas ekkoni la proksiman kaj malproksiman historion de Varna — la antikva Odesus, ĝian kulturon kaj ĝian riĉecon.

Varna posedas la unikan en Bulgarujo maran zoologian stacion — akvarion, kie oni povas vidi la faŭnon kaj parton de la kreskaĵaro de la Nigra Maro.

La sola en la regno Mara Muzeo donas al la vizitanto eblon konatiĝi kun la ĉiaspecaj rimedoj por marveturado, akcesoraj instalaĵoj, marbataliloj ktp.

La urba biblioteko havas riĉan kolekton da libroj el la bulgara literaturo, kiel ankaŭ tradukitajn verkojn el la eksterlandaj literaturoj. Ĝi havas ankaŭ librojn en Esp. kaj en aliaj fremdaj lingvoj kaj grandan kvanton da eksterlandaj gazetoj kaj revuoj. Ĉe la sama estas publika legejo.

La restado en Varna dum la somero estas agrabla ne nur pro la favoraj klimataj kondiĉoj, komforto, pureco kaj modernaj aranĝoj, kiujn ĝi havas, sed ankaŭ pro tio, ke la urbo estas ĉirkaŭita de multaj belaj lokoj, kiuj estas mirindaj objektoj por promenadoj kaj ekskursoj. Vizitindaj lokoj estas:

La monaĥejo Alaĝa (en kavernoj), 18 kilometrojn norde de la urbo. Laŭ sia situo, originaleco kaj historia valoro ĝi estas, eble, la unika monaĥejo en Eŭropo, ĉizita en rokoj dum la unuaj tagoj de la kristanismo en la Balkana duoninsulo.

Tute apud la piedo de la rokoj troviĝas la turista domo „Princo Simeon“, dua laŭ sia grandeco en Bulgarujo, kiu havas ĉian komforton por tranoktado kaj ripozo.

Uzun-Kum (La ora sablo) etendiĝas oriente de la monaĥejo Alaĝa. Tio estas la plej longa kaj la plej bela strando sur la bordo de la Nigra maro. Laŭlonge de ĝi estas kreita bela parko kun turista domo kaj restoracio. Ĝis la monaĥejo Alaĝa kaj Uzun-Kum oni povas veturi per aŭtomobilo, aŭtobuso aŭ per boatoj sur la maro.

Sveti Konstantin (sankta Konstanteno), mara banloko, troviĝas sur la bordo de la maro, 16 kilometrojn norde de la urbo. Ĝi estas ligita kun la urbo per unuaranga ŝoseo. Tie troviĝas antikva monaĥejo, kiu donis sian nomon ankaŭ al la banloko.

Tiu ĉi banloko kaj somerrestadejo estas unika loko por plena ripozo kaj markuracado. Ĝi havas belegan naturon, strandon, varmajn kaj malvarmajn marbanojn, unuarangan restoracion kaj bonegan hotelon kun fluanta akvo en ĉiu



La monaĥejo „Alaĝa“

ĉambroj kaj ĉiaj modernaj aranĝoj. Inter „Sveti Konstantin“ kaj la urbo Varna ekzistas regulaj aŭtobusaj linioj. La ŝoseo serpentumas meze de la famaj vinberĝardenoj de Varna; ambaŭflanke viciĝas, unu post alia, koketaj vilaoj, kaj malantaŭ ili, sudoriente, aperas la senlima vastaĵo de la maro.

La enfluejo de la rivero Kamĉija, 40 kilometrojn sude de la urbo, estas la regno de la akvaj lilioj kaj de la centjaraj arbaroj. Al ĝi oni veturas surtere per komfortaj aŭtobusoj aŭ per rapidaj aŭtomobiloj kaj, surmare — per boatoj. La surtera vojo pasas tra la pinarbaro „Gjundjuza“, rampas sur la mallataj montoj de la orienta parto de la Balkano, pasas tra pentrindaj regionoj, kaj fine atingas la majestajn arbarojn, meze de kiuj fluas la rivero Kamĉija, por ĵeti siajn akvojn en la maron.

La maŭzoleo de Vladislao Varnenĉik troviĝas 6 kilometojn sudokcidente de la urbo, sur la ŝoseo al Dobriĉ (Bazârĝik). En la jaro 1444, en batalo kontraŭ la turkoj pro la kristanismo, ĉi tie pereis la pola-hungara reĝo Vladislao Varnenĉik. Mallonga ekskurso ĝis la historia morto-loko de la reĝo-kavaliro povas esti farita per ĉia veturilo, eĉ piedire.

Dikili-taŝ (ŝtona arbaro), 18 kilometrojn okcidente de Varna. Interesaj restaĵoj de iama fundo de maro. Oni veturas sur la lago per boatoj aŭ surtere per aŭtomobilo.

Galata — vilaĝo-somerrestadejo, 6 kilometrojn sude de Varna, konstruita sur

samnoma promontoro, sur kiu troviĝas la granda palpebrumanta lumturo de Varna. Oni veturas ĝis tie surmare aŭ surtere. „Galata“ havas sian propran strandon, malgrandan restoracion kaj turistan hotelon. De tie la panoramo de Varna, en tago kaj en nokto, estas majesta, belega kaj neforgesebla.

„Ĝanavar tepe“, 6 kilometrojn sude de Varna. Loko por ekskursoj, kie troviĝas restaĵoj de antikva preĝejo. Veturado per aŭtomobiloj, aŭtobusoj kaj fiakroj.

Krom per privataj motorboatoj, velboatoj kaj remboatoj, oni povas ekskursi plej komforte per la novaj grandaj motorboatoj de la administrejo de la Mara Apudborda Navigacio.

La Bulgara Vaporŝipa Kompanio aranĝas per la vaporŝipo „Evdokia“ regulajn ekskursojn ĝis la tuta bulgara bordo de la Nigra maro. Per la vaporŝipo „Ferdinand“ ĝi aranĝas regulajn ekskursojn al Konstantinoplo kaj returne. Al la eksterlandaj vojaĝantoj de tiu ĉi vaporŝipo oni donas specialan rabaton de la ordinara tarifo kaj plisimpligon de la pasportaj formalajoj.

Generale, Varna, per sia bela situo kaj per sia komforto, donas eblecon por agrabla, malkara kaj utila restado, kiu povas esti variigita per ekskursoj en ĝiaj belaj ĉirkaŭaĵoj.

Eble sur la bordo de la Nigra maro ne ekzistas loko tiel malavare dotita de la naturo per diverseco, beleco kaj majesteco, kiel Varna — la reĝino de la Nigra Maro, kiu juste portas tiun ĉi nomon.

Tradukis: I. S.



Oni bone amuziĝas en la maro

V A R N A

kiel komerc-industria urbo

Ankoraŭ en antikva tempo, Varna, tiam konata sub la nomo Odesus, estis unu el la plej gravaj industriaj havenoj de la Nigra maro. Ĝi estis la centro de kvin unuigitaj urboj, kiuj havis vastan komercon kun proksimaj kaj malproksimaj landoj, kiel Ĝenovo, Venecio, Dubrovnik, Sirio k. a.

Post la liberiĝo de la turka jugo, Varna fariĝas unua kaj plej grava haveno de Bulgarujo. Per ĝi estis enportataj preskaŭ ĉiuj komercaĵoj el eksterlando kaj eksportataj la terkulturaj produktoj de nia lando. La urbo floris, ĉirkaŭ la haveno kreiĝis komercista kvartalo kun multaj varodeponejoj kaj konservejoj.

Sed, post la mondmilito, la fortranĉo de Dobruĝa havis malfavoran influon sur ĝia komerco kaj la kvanto de la el- kaj enportataj komercaĵoj malaltiĝis konsiderinde.

Kiel kompenso de ĉi tio, Varna kreskas kiel industri-metia urbo. Ĉi tie troviĝas kelkaj el la plej grandaj entreprenoj en Bulgarujo: Akcia Societo „Tekstil“ — ŝpin- kaj teksfabriko por kotono, kun 2500 laboristoj; Akcia Societo „Car Boris“ — ŝpinfabriko por kotono kun 2000 laboristoj; Akcia Societo „Koralovag“ por konstruado kaj riparado de vaporŝipoj, lokomotivoj vagonoj kaj pontoj; Akcia Societo „Vulkan“, ferofandejo; „Kiril“, fabriko por ŝtofoj el juto kaj multaj aliaj industriaj entreprenoj. Proksime al Varna — en vilaĝo Beleva — troviĝas la plej granda bulgara fabriko por vitro, kaj en vilaĝo Devnja estas instalitaj la plej grandaj modernaj muelejoj.

Sendepende de tio, dank' al la elektra energio, en la urbo troviĝas multaj metiaj laborejoj, kiuj iom post iom fariĝas industriaj.

Parolante pri la komerca kaj industria disvolviĝo de Varna, estas necese noti la signifon, kiun ĝia haveno havas aŭ povus havi por landoj ekster Bulgarujo.

Tiel, la plej rekta vojo de centra Eŭropo — Ĉeĥoslovakujo, Germanujo kaj

Hungarujo — al la proksima Oriento kaj al Antaŭazio pasas tra la Nigra maro, kaj la plej oportuna elirpunkto de tiu ĉi vojo estas Varna. Tiu ĉi vojo havos apartan signifon, kiam Anatolio kaj Antaŭazio ligiĝos kun la Nigra maro per rektaj fervojaj linioj kaj komencos serĉi rektan kontakton kun centra Eŭropo — nome per Varna.

Grandega okazintaĵo en la komerca kaj ekonomia vivo de Varna estas la ĉiujare organizata komerc-industria ekspozicio — de la mezo de Aŭgusto ĝis la 5-a de Septembro. Tiun ekspozicion partoprenas industriistoj kaj metiistoj el la tuta lando. La sama ekspozicio ricevis apartan signifon post ĝia deklaro kiel internacia en la jaro 1936, kio donis eblecon al multaj eksterlandaj industriaj entreprenoj partopreni en ĝi. La perspektivoj por prospero de ĉi tiu ekspozicio estas evidentaj kaj la intereso pri ĝi el eksterlando estas grandega.

Tradukis: K. D.

LA FELIĈULOJ !



SUNO, AMO, LM LIBRO

Есперантска литература.

Голѣмъ изборъ есперантски значки отъ 18—25 лева.

Каталогъ бесплатно.

Поржчки при „СПИКТУРН“
международенъ институтъ

50. ул. Алабинъ — София

Ĝeneralaj informoj pri la urbo

V A R N A

En la Marĝardeno troviĝas la domo de la Komunuma Banloka Direkcio. En tiu ĉi domo estas koncentritaj ĉiuj servoj pli la banloko: oficejo por registrado de la bangastoj, pasportoficejo, somera filio de la Bulgaraj Ŝtataj Fervojoj, monŝanĝejo k. a.

Tie estas aranĝataj la pasportaj formalajoj de la eksterlandaj bangastoj. Al la dispono de la bangastoj tie staras listo de normigitaj kaj klasigitaj loĝejoj por la sezono. La gastoj rajtas tiurilate peti la senpagan helpon de la specialaj oficistoj, por trovi loĝejon, ricevi informojn de la banloko ktp.

Ĉiuj eksterlandaj bangastoj, kiuj posedas turistan aŭ bansezonan vizon, devas en tri tagoj registri sin en la Banloka Direkcio. Por tiu ĉi registriĝo ili pagas 80 levojn por la persono kun unuopa pasporto. Membroj de la familio kaj grupoj kun komuna pasporto ricevas rabaton de tiu ĉi kotizo. Kontraŭ tiu ĉi registriĝo la bangastoj ricevas de la Banloka Direkcio senpagan elirvizon, kiu validas ĝis la fino de la bansezono — la 31 de Oktobro.

Bangastoj, posedantaj turistan aŭ bansezonan vizon, devas resti minimume 7 tagojn en la lando. Se oni restas malpli longan tempon en la lando, la registriĝo ĉe la Banloka Direkcio ne estas necesa. Sed, tiaokaze, ĉe la landlimo oni pagas la ordinaran prezon de la elirvizo.

Eksterlandaj bangastoj, posedantaj turistan aŭ bansezonan vizon, tuj post la transiro de la bulgara landlimo, ricevas 50% rabaton en la Bulgaraj Fervojoj.

De la 1-a de Julio ĝis la 1-a Septembro ĉe la Banloka Direkcio funkcias la monŝanĝejo de la Bulgara Nacia Banko.

En Varna ekzistas bone organizita omnibus-servo, kiu, per siaj komfortaj veturiloj, ligas la urbo kun ĉiuj ĝiaj ĉirkaŭaĵoj, je prezoj malaltaj dum la somera sezono.

En la urbo kaj al ĝiaj ĉirkaŭaĵoj oni veturas per fiakroj aŭ per aŭtomobiloj. Veturo per fiakroj, de la fervoja stacidomo ĝis la urbo, kostas 30 levojn por du personoj. Por tri aŭ pli da personoj — 40 levojn.

La aŭtomobiloj havas oficiale aprobitan tarifon, kiu estas anoncita en videbla loko en la veturilo mem.

Per la centra fervoja linio Sofio—Varna, la urbo estas ligita kun ĉiuj urboj de la lando. Ĝi estas ligita ankaŭ kun la tuta ŝosea reto de Bulgarujo. La ŝoseoj estas kompare bonaj kaj ebligas longajn vojaĝojn per aŭtomobiloj.

De la mez-eŭropaj landoj al Varna oni povas veturi per kelkaj vojoj: tra Beograd, Dragoman, Sofio—Varna; sur la Danubo, per vaporsipo, ĝis iu ajn Bulgara haveno sur la Danubo (Vidin, Lom, Sviŝtov, Ruse) kaj de tie per fervojo al Varna: tra Bukareŝto, Ĝiurgiu, Ruse—Varna, aŭ Bukareŝto, Bazarĝik, Oboriŝte—Varna.

Restoracio „EUROPO“ — Varna

Gastoj de Varna!

En mia unuaklasa restoracio „Eŭropo“, bulvardo Slivnica № 11, proksime al la maro, vi trovos la plej bongustajn kaj samtempe tre malkarajn manĝaĵojn. Por esperantistoj specialajn favorprezojn.

Esperanto parolata.

Korege vin invitas la posedanto:

TEODOR POPOV



Kvieta angulo de la Margardeno kun panoramo de la strando kaj parto de la vilaoj apud la maro.

ЦЕНТРАЛЕНЪ КОМИТЕТЪ

на Бълг. Еспер. Съюзъ

№ 418

София, 23. V. 1938

ОКРЪЖНО

До Есперантскиятъ дружества въ България

Драги съидейници,

Централниятъ комитетъ на Българския Есперантски Съюзъ, вземайки поводъ отъ редъ запитвания, между които и, напоследъкъ, отъ Софийското есперантско дружество, намира за умѣстно да заяви, че:

1. *Есперантскиятъ страници* на ежедневнитъ вестници „Заря“ и „Нова камбана“, както и тия, които биха се въвели въ други вестници, сж дѣло на частна инициатива. Българскиятъ есперантски съюзъ не участвува прѣко или косвено въ тѣхното редактиране; отговорността за съдържанието имъ се носи само отъ лицата, които ги уреждатъ.

2. Централниятъ комитетъ гледа на откриването на тѣзи страници като на единъ голѣмъ успѣхъ на есперантското движение въ страната и намира, че тѣ могатъ да допринесатъ много за по-голѣмо раздвижване на българскитъ есперантисти по села и градове.

3. Централниятъ комитетъ, все пакъ, трѣбва да напомни на уредницитъ на тия страници, да иматъ предвидъ нееднократно подчертаваната неутралностъ на есперанто и есперантското движение къмъ всички политически и религиозни въпроси и бдятъ да не се превърнатъ тѣзи страници въ проводници на разбирания и тенденции, които биха дали на обществото невѣрна и превратна представа за сжщността на есперантското дѣло, което има чисто културно-просвѣтенъ характеръ безъ никаква политическа окраска.

Председателъ: (п) *Ат. Д. Атанасовъ*
Секретаръ: (п) *Б. Т. Октомврийски*



Monumento de la libereco en Sevlievo

La 25-a Jubilea Bulgara Esperanto Kongreso

Sevlievo, 16—18 Julio 1938

Известие отъ мѣстния конгресенъ комитетъ

Програма на конгреса
(приблизително опредѣлена):

16. юлий (сѣбота) — посрѣщане и разквартируване на конгресиститѣ, *interkonatiĝa vespero* въ Ловния домъ;

17. юлий (недѣля) — откриване, поздравления, заседания, *литературно-музикална вечерь*. (Съидейници, които могатъ да взематъ участие въ литературно-музикалната вечерь, да съобщатъ на конгресния комитетъ на време, като посочатъ точно какво ще изнесатъ).

18. юлий (понеделникъ) — *fakkunsidoj* (частни заседания на есперантисти — учители, въздържатели и други); следъ обѣдъ почватъ излетитѣ.

Ще се уредятъ заседания и реферати на лѣтния есперантски университетъ. Желаетелитѣ участници и лектори да съобщатъ (последнитѣ да посочатъ и темитѣ, на които желаятъ да говорятъ). Заседанията на лѣтния университетъ може да продължатъ и следъ конгреснитѣ дни.

Следъ конгреса се уреждатъ 4 излета съ главни обекти: Амбарица, Купена, Юмрукъ-чалъ, Мара-гидикъ, Кадемлия, Мазалатъ, Узана, Св. Никола и др. Маршрутитѣ на излетитѣ свършватъ въ Карлово, Калоферъ, Габрово, Севлиево, така че да е удобно на конгресиститѣ да продължатъ пѣтя си безъ да се връщатъ.

Конгресни издания


Пжтеводниятъ листъ за Севлиево, богато илюстриранъ, отпечатанъ съ цвѣтни мастила на луксозно хартия, съ текстъ на Есперанто и бѣлгарски, се изпраща всѣкому при поискване.

Алиджила и афиши сж разпратени. Онѣзи, които не сж получили, да се обадятъ, за да имъ се изпратятъ.

Конгресни марки. Ще се пачататъ наново 6 вида конгресни марки съ изгледи отъ Севлиево, околноститѣ и Балкана.

Пощенски картички сж отпечатани нѣколко вида и се продаватъ по 4 за 1 левъ.

За есперантската изложба се събира материалъ: есперантски книги, брошури, вестници, списания, пощенски картички и др. Молимъ съидейницитѣ, които още не сж изпратили материалъ, да се обадятъ на конгресния комитетъ и да изпратятъ каквото могатъ.



Fervojoj stacioj, fervojaj linioj kaj ŝoseoj, per kiuj oni povas veni al Sevlievo.

С Ъ О Б Щ Е Н И Я

Севлиево има постоянни и редовни автомобилни съобщения съ околните желѣзопѣтни станции (гледай картата):

11·10 ч., 18 ч.	↓	Севлиево	↑	9·50 ч., 18 ч.
13·30 ч., 20·20 ч.	↓	Павликени	↑	7·30 ч., 15·40 ч.

За конгресиститѣ този пѣтъ ще струва **45** лева.

Влаковетѣ пристигатъ на желѣзопѣтната станция Павликени:

Отъ София, Видинѣ, Ломѣ, Орѣхово, Свищовѣ на 13·57 (бързѣ).

Отъ Варна, Русе 15·21 (бързѣ), отъ София 5·15 (пѣтнишки), отъ Варна 7·22 (пѣтнишки).

Автомобили между Севлиево и Габрово:

9·30 ч., 16·30 ч.	↓	Севлиево	↑	12·30 ч., 19·30 ч.
11 ч., 18 ч.	↓	Габрово	↑	11 ч., 18 ч.

Конгресиститѣ плащатъ за този пѣтъ **30** лева.

Влакове пристигатъ на ж. п. станция Габрово отъ Ст. Загора на 14·20, 21·20.

Автомобили между Севлиево и Търново пѣтуватъ всѣки день, освенъ недѣля, въ следнитѣ часове:

6 ч.	↓	Севлиево	↑	19 ч.
8 ч.	↓	Търново	↑	17 ч.

Конгресиститѣ плащатъ за този пѣтъ **40** лева.

Автомобили между Севлиево и Ловечѣ пѣтуватъ само срѣда и недѣля:

6 ч.	↓	Севлиево	↑	17·30 ч.
7·30 ч.	↓	Ловечѣ	↑	16 ч.

Конгресиститѣ плащатъ за този пѣтъ **40** лева.

La 25-a Jubilea Bulgara Esperanto-Kongreso

Sevlievo, 16—18 Julio 1938

La 25-a Jubilea bulg. Esperanto-kongreso okazos en la pitoreska urbo Sevlievo de la 16-a ĝis la 18-a de Aŭgusto. Sevlievo, situita proksime al la Meza Balkano, estas ligita per aŭtomobillinioj kun la najbaraj fervojaj stacioj: Pavlikeni, Gabrovo, Tirnovo kaj aliaj. La gastamaj loĝantoj de Sevlievo faros ĉion eblan por aprabligi la restadon de ĉiuj samideanoj kaj gastoj.

La loka Societo aranĝos grandan esperanto-ekspozicion, en kiu estos elmontritaj libroj, broŝuroj, gazetoj, verkoj de bulgaraj aŭtoroj tradukitaj en Esperanto, ilustritaj poŝtkartoj, korespondaĵoj el la tuta mondo, „Esperanto en la turismo“ ktp.

Postkongresaj ekskursoj en la Meza Balkano. Oni vizitos la jenajn lokojn: Jumrukĉal, Ambarica, Maragidik, Kademlia, Mazalat ktp.

Estas eldonitaj specialaj propagandaj poŝtkartoj kaj glumarkoj pri la kongreso, kun teksto en bulgara lingvo kaj en Esperanto. La lastaj estas sendataj senpage al ĉiu petanto.

Sanpage oni sendas ankaŭ ilustritan gvigfolion pri Sevlievo, kun teksto en Esperanto.

Kongreskotizo 10 levoj, pagebla ĝis la kongreso.

Ĉion adresi al: *Simeon Ĥesapĉiev, Sevlievo. Bulgarujo.*

ЛИЧНА КОРЕСПОНДЕНЦИЯ СЪ СЕВЛИЕВЦИ


Конгресисти, които искатъ предварително да завържатъ лична кореспонденция съ съидейници отъ Севлиево, да се обадятъ на конгресния комитетъ.

Кагај gesamideanoj, върнете алиджилата най-късно до 12 юлий, като отговорите и на следнитъ въпроси: 1. Презъ кжде ще дойдете: Павликени, Габрово, Търново, Ловечъ; 2. Денътъ и приблизително часътъ, когато ще пристигнете. По-добре е да се пжтува групово, та да се съобщава и колко души пристигатъ. Онѣзи, които закъснѣятъ съ горнитъ сведения, не ще бждатъ посрещнати навреме и ще затруднятъ и себе си и конгресния комитетъ.

Всичко за конгреса да се отправя до:

Симеонъ Ст. Хесапчиевъ, гимн. учителъ, Севлиево.

Молимъ съидейницитъ да дадатъ извлѣчение отъ настоящето когресно известие въ провинциалния печатъ, като следъ това изпратятъ на конгресния комитетъ пробни броеве.



Pejzaĝo el Sevlievo — la urbo de la 25-a Jubilea Bulgara Esperanto-kongreso

30-a Universala Kongreso de Esperanto

Londono — 30 Julio — 6 Augusto

Kongreskotizo. L. 1—10—0. (Ĉirkaŭ 600 bulg. lv.) La edzo aŭ edzino de kongresano, kaj gejunuloj ne pli ol 20-jaraj pagas po 15 ŝil. Pagiloj estu pagablaj al Internacia Esperanto-Ligo.

Loĝejoj kaj Ekskursoj. Mendiloj estas jam senditaj al kongresanoj, kaj pliaj ekzempleroj estas haveblaj ĉe la kongresoficejo. La komitato ne povas garantii loĝadon aŭ partoprenon en ekskurso al kongresano, kiu ne plenumas la kondiĉojn.

Programo. La provizora programo jam aperis kaj oni esperas sendi la kongreslibron al kongresanoj en junio. La jenaj novaj sciigoj, tamen, sendube interesos la legantoj:

Dimanĉo. Multaj restoracioj en Londono estas fermitaj dimanĉe. Tial oni aranĝis komunan tagmanĝon por mil kongresanoj en Lyons' Oxford Corner House, tuj kontraŭ la Dominion Theatre, kie okazos la Solena Inaŭguro. La kosto estos 2ŝ. 6p., kaj biletoj estos haveblaj en la kongresejo tuj post la alveno en Londono. La ceteraj kongresanoj povos tagmanĝi en aliaj restoracioj sufiĉe proksime.

La Diservo okazos en The Citi Temple, granda preĝejo atingebla en dek minutoj de la restoracio supre-menciita. La Diservon kondukos Pastro W. H. Downes, bone konata kaj sperta angla samideano.

La Teatraĵo okazos lunde kaj marde en la Scala Teatre, Charlotte Street, W. 1, tute proksime al la kongresejo. Ĝi estos komedio: Eliza Restas, kiun prezentos la Neilson-Terri Guild of Dramatic Art, kies membroj nun kun aparta sukceso lernas Esperanton en Cseh-mesoda kurso de f-ino Saxl. Duono de la kongresanoj ĉe estos la teatraĵon lunde, kaj duono marde. Je tiuj du tagoj, la kongresanoj, kiuj ne estos en la teatro, povos ĉeesti filmprezentadon en la kongresejo.

Balo. La kongresa balo okazos ĵaŭdon en Alexandra Palace, kelkajn kilometrojn norde de la centro. Specialaj vagonaroj portos la kongresanojn al kaj de la balsalono. Bonvolu laŭeble kunporti nacian kostumon!

Vendredon vespere okazos nova aranĝo, kiu, certe, plaĉos al la kongresanoj. En la Central Hall, Westminster, — unu el la plej grandaj koncertejoj en Londono — aro da tre lertaj infanoj el la Nacia Hejmaro kaj Orfejo por infanoj prezentos al la kongresanoj allogan programon de kantoj, dancoj, kant-teatraĵetoj, korpekzercoj k. t. p.

Fakaj Kunsidoj estas aranĝitaj por Skoltoj, Bahaanoj, T.A.G.E., Katolikoj, Kvakeroj, la Unuigita Komitato por Impostoj laŭ la Valoro de la Tero, I.S.A.E., Komerco, K.E.L.I., Turismo, Aviado.

La kunsido aranĝita de la Kvakeroj estos granda kunveno sub la titolo „La Nuna Mondstato: Kiel Povas Esperanto Hodiaŭ Plej Bone Helpi al Mondfrateco kaj Internacia Paco.“ Inter la parolantoj estos D-ro Edmond Privat.

Membraro: Ĝis nun aliĝis al la kongreso pli ol 1300 el pli ol 26 landoj.

Internacia tendaro por esperantistoj gejunuloj

Dum la semajno post la Universala Kongreso okazos tendaro por esperantistaj gejunuloj (aĝlimo 30 jaroj) ĉe bela tendarkampo apud Ipswich en Orientanglujo.

Jen bona ŝanco intimiĝi kun kampara kaj provinca vivo en Anglujo meze de Esperantistoj.

La tendarejo situas en bela kamparo proksime de Ipswich (90,000 loĝantoj) kaj estas disponigita al ni de Ipswich Rotaria Klubo. Estas bona paviliono kaj naĝbaseno tie, kaj akvokondukila sistemo estas instalita. La tendojn pruntedonos la Ipswich Skoltaro.

La tendaro estas organizita de la B. E. A. en la kadro de la Postkongresaj Aranĝoj. Kunlaboros la loka Esperanta Grupo kaj Skolta Esperantista Ligo. Ĝi estas partoprenebla de iu ajn esperantista junulo, ĉu kongreseno aŭ ne. La kosto por unu samajno estas L1. 0. 0. Ĉi tio enkalkulas la manĝaĵojn.

Apartaj, malkaraj ekskursoj estos aranĝitaj por laŭdezira partopreno.

Oni anoncu sin al S-ro C. C. Goldsmith, 30-a Universala Kongreso de Esperanto, Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo.

Ekskursoj dum kaj post la kongreso

Merkredon, la 3-an de aŭgusto, okazos kvar ekskursoj:

1. Vizito al „Shakespeare-lando“. 350 kilometra rondvojaĝo en luksaj aŭtoĉaroj, kun vizito de la mondfama naskiĝurbo de la angla poeto — Stratford-on Avon.
2. 230 kilometra ekskurso tra la bela suda regiono kun vizitoj al Eastbourn kaj Hastings ĉe la marbordo.
3. Rondveturo kaj vizito al la reĝa kastelo en Windsor kaj la palaco Hampton Court.

4. Rondveturo kun vizito al Whipsnade, la unika kaj ampleksa bestoparko en bela kamparo, kie ĉiuj bestoj vagas relative libere en natura ĉirkaŭaĵo.

Post-kongresaj aranĝoj:

- A. Septaga ripoza libertempo en High Leigh, Hoddesdan. High Leigh estas bonege ekipita gastodomo en la bela kamparo proksimume 30 km. de Londono. Dum la matenoj okazos prelegoj de la Ĉe-instruisto Sigismundo Pragano pri la Esperanto--Literaturo. Posttagmeze okazos libervolaj ekskursoj kaj vagadoj, kaj vespere koncertoj, dancoj k. a.
- B. Granda ekskurso al kaj tra Skotlando dum la semajno post la kongreso.
- C. Bicikla rondvojaĝo tra la suda parto de Anglujo de la 7-a de Aŭgusto ĝis la 11-a.
- D. Tendaro apud Ipswich, orienta Anglujo, de la 7-a Aŭgusto ĝis 13-a, por gejunuloj 14—23 jaraj.

La bela kongres-glumarkoj estas ankoraŭ haveblaj de la kongresoficejo po 6 pencoj aŭ 2 internaciaj respondkuponoj por 50.

Poŝtkartoj de la Kongreso estas haveblaj po 3 por unu penco, plus afranko, aŭ 12 por du respondkupoj, afrankite.

ĈIU ESPERANTISTO, senescepte,
devas esti membro de

Internacia Esperanto Ligo (I. E. L.) **LONDONO**

Ĝi donas al:

1. **Membro kun jarlibro** — membrokarton, servokuponaron kaj la Jarlibron — por 80 levoj.
2. **Membro-abonanto** — ĉion kiel al Membro kun Jarlibro ka ankaŭ la monatan gazeton „*Esperanto Internacia*“ — por 200 levoj.
3. **Membro-abonanto-heroldo** — ĉion kiel al Membro kun Jarlibro kaj ankaŭ la semajnan gazeton „*Heroldo de Esperanto*“ — por 440 levoj.

Detalajn informojn petu de la

Ĉefdelegito por Bulgarujo: **IVAN KOTOV**, Bulg. Nacia Banko, RUSE
Poŝtĉekkonto 2434.

RECENZO

Димитъръ Ивановъ, лекторъ по есперанто: ЕСПЕРАНТО-БЪЛГАСКИ РЕЧНИКЪ. Издава авторътъ. Русе 1937, стр. 152, цена 15 лв.

Dimitr Ivanov, lektoro de Esperanto: ESPERANTO-BULGARA VORTARO. Eldono de la aŭtoro. Ruse 1937, paĝoj 152, prezo 15 lv.

Jen nove aperinta vortareto, kiu surprizas per multaj aferoj:

1. Per sia bela eksteraĵo. La kovrilo estas tre bela, sed la stelo staras malrekte: supre devus esti nur unu pinto.

2. Per sia malkareco.

3. Per la titolo de la aŭtoro „lektoro de Esperanto“. Ni ne scias kiu kaj kie donis al la aŭtoro ĉi tion titolon, kaj kian diplomon li posedas por havi la rajton nomi sin „lektoro de Esperanto“. Estus tre utile montri post la titolo kiajn sciencajn rangojn posedas la portanto de la titolo, ĉar, se li mem atribuis al si ĉi tiun nomon, ĝi estas tre malbona signo — por li kaj ankaŭ por nia komuna afero. Kio estus, se ĉiuj komen-
cus, laŭ sia propra bontrovo, nomi sin „lektoroj“, „profesoroj“, „direktoroj“ kaj eĉ „reĝoj“ de Esperanto? Oni devas scii, ke en Esperantujo ekzistas sciencaj titoloj, sed por akiri ilin oni bezonas iri difinitan vojon, kaj ke neniu rajtas doni al si mem iajn titolojn.

4. La vortaro surprizas ankaŭ per la indiko, ke ĝi estas aprobita de la Centra Komitato de la B. Esp. Asocio, per decido de la 10. XI. 1937. Mi kontrolis kaj sciiĝis, ke C. K. donis nenian adrobon: ĝi nur permesis presigi en la asocia organo reklamon pri la vortaro. Neniam aprobo pri la vortaro mem. La aŭtoro havis bonan intencon — li opinias, ke la esperantaj verkoj, kiuj aperas en Bulgarujo, devus esti aprobitaj de la C. K. de B. E. Asocio, sed li mem fuŝis sian ideon, indikante ke la vortaro estas aprobita, dum fakte ĝi ne estas tia.

5. Surpriza estas la aranĝo de la vortaro. Ĝi konsistas el tri partoj: la unua komenciĝas per A kaj finiĝas per Z. La dua parto ankaŭ komenciĝas per A kaj finiĝas per Z. La tria estas „suplemento“. La kaŭzo de tiu ĉi divido restas kaŝita por la leganto:

nenia antaŭparolo aŭ postparolo. Ŝajnas, ke la aŭtoro prenis la materialon el du, tri aŭ eĉ pli da fontoj, kaj ne havis tempon aranĝi ĉiujn vortoj en alfabeto ordo. Kaj tia aranĝo povas facile erarigi la leganton.

6. La vortareto havas ankaŭ tiun ĉi gravan mankon, kiun havas preskaŭ ĉiuj vortaroj, kiuj aperis en Bulgarujo. La manko konsistas en tio, ke la aŭtoroj ne scias aŭ ne volas scii, ke ekzistas certa ordo pri la vortrezoro de la lingvo internacia. La esperantaj vortoj estas: 1. Oficialaj kaj 2. Private rekomendataj. La oficialaj vortoj estas: vortoj de la Universala Vortaro kaj de ĝiaj Aldonoj. La private rekomendataj vortoj estas: Zamenhofaj, kaj de aliaj aŭtoroj. Ŝajnas, ke por la aŭtoroj de preskaŭ ĉiuj Esperanto-vortaroj en Bulgarujo (kun multaj esceptoj), tiu ĉi afero estas terra incognita. Ili presigas en siaj vortaroj ĉiujn vortojn, kiujn ili nur povas trovi, en formoj, kiujn ili mem opinias bonaj. En naciaj lingvoj oni ne toleras tiuspecan agadon. Kion diri pri la lingvo internacia, kie la afero estas bazita sur la principoj de komuna interkonsento! Oni povus argumenti: „sed oni uzas tiujn ĉi vortojn“ Bone, se estas tia la argumento, tiam en ĉiu bulgara vortaro devus troviĝi ankaŭ la vortoj: баро, готъ, бачкамъ, кинта, гризкация, абизанъ, ĉar „oni ilin uzas“. Ekzistas leĝoj por tiu ĉi afero, — ankaŭ en Esperantujo. Kaj se oni volas en ia vortaro prezenti ĉiujn vortojn, kiuj ekzistas en Esperantujo, oni nepre devas ĉe ĉiu vorto montri per speciala signo al kiu kategorio ĝi apartenas.

7. La vortaro surprizas enkaŭ per la multaj eraroj, kiuj troviĝas en ĝi. Mi tre surprize trarigardis nur la unuan parton de la vortaro kaj mi povis trovi la jenajn erarojn aŭ neĝustajojn.

a) Vortoj, kiuj estas erare aŭ mallerte tradukitaj: aklami, aklamo, akuŝi, agonio, atrofio, amindumi, apatia, apatio, aŭkcio, aŭkciisto, eklezia, ekscitiĝema, ekspiro, embaraso, elstari, escepte, freneziĝi, familiara, fidebla, fideleco, fidinda, frosta, humiliĝi, humiliĝi, kuntiriĝi, malesti, malesto, malnobla, malnobligi, malsimpla, malsimpligi, malŝati, memorebla, mirego, nazmuko, nomata, nigriĝi, nombro, paĝo, pardonema, piediri, procedo, vaporigi.

b) Vortoj, kiuj estas malbone tradukitaj. Por iliaj tradukoj oni povas

elekti pli trafajn bulgarajn vortojn, ĉar la donitaj en la vortaro estas aŭ ne tre belaj, aŭ nur proksimumaj. Multaj el tiuj ĉi vortoj havas en la lingvo bulgara pli ol unu respondajn formojn, kaj inter ili ne estas elektita la plej bona:

admiri, akcenti, artifika, avara, aktuala, akurata, akuzinto, asimili, amarigi, anticipi, argumenti, ĉevaleto, ĉevalido, bulko, ĉelo, dekduo, diskreta, decidigi, dolorá, dorlotema, efektivo, ekbrilo, ekridegi, diversaĵo, ekskui, elmontri, evitema, farto, felisto, ekzekutisto, estas, estos, estis, frakasi, fritilo, garbejo, glazuristo, graseco, ĝuego, ĝuo, honorebla, humila, imaga, incitebla, insida, instruita, impresi, jungitaro, ĵurintaro, navernulo, konfidema, konfuza, konfuziĝi, konsistigi, kunveni, kuŝigi, majstraĵo, malakurata, malaminda, ma'daŭrigi, maldiskreta, malgrandeco, malkonvena, malobservi, malpia, malrajta, malstreĉi, malsupro, memmortigi, meritopleta, murmuri, notinda, odorigi, operacii, ordema, pafo, perfidi, persiste, persistema, popolamaso, poemo, pompa, profani, virinsekse, virseksa, zorgoplena, buĉisto.

c) Stranga fakto! Ankaŭ en la bulgara parto troviĝas riproĉindaĵoj. Sub la influo de Esperanto, la aŭtoro kreis novajn bulgarajn vortojn laŭ la reguloj de la lingvo internacia. Li forgesis, ke la afero ne estas egala. La kreitaj vortoj povas esti bonaj, sed ili sonas strange kaj eĉ ridinde. Jen kelkaj perloj inter ili: предгрижие, забавителъ (шутъ); обожателенъ, въобразителенъ, отбележителенъ, разискливъ, глезливъ, помогливъ, почитливъ, подражливъ, дразливъ, скривливъ, изпользуливъ, гладило, пържило (тиганъ), затворило (fermilo), болногледамъ, месоосолявамъ, босоходствувамъ, плъзгонадбъгвамъ.

d) La preseraroj estas en efektiveco pli multenombraj, ol estas montritaj en la listo.

e) Ekzistas ankaŭ tre maloftaj aŭ eĉ strangaj esperantaj vortoj, kiujn oni ne bezonas en vorareto: malesti (!?!), ĵurintaro (?), jungitaro (?), enterigiro ktp.

Tio estas eraroj, troveblaj nur en la unua parto de la vortaro. Ne ekzistas kaŭzoj, ke ilia nombro en la dua parto kaj en la „Suplemento“ estu malpli granda. Se oni ekzamenos pli detale la tutan vorttrezoron de la proponata vortareto, oni certe trovos, ke la eraroj estas pli multaj kaj pli gravaj, ol estas

montrite ĉi tie. Kaj tiu ĉi fakto malaltigas la valoron de la verko.

Fine, oni povas diri, ke la aŭtoro havis bonan intencon: pliriĉigi la bulgaran esp.-literaturon per nova vortaro. Sed la efektiveco montras, ke la bona intenco ankoraŭ ne sufiĉas. Necesaj estas multaj aliaj aferoj. Kaj la eldono de tiu ĉi vortaro kondukas nin al la penso, ke la C. K. de B. E. Asocio devas fine trovi ian manieron por kontroli kaj revizii la esp.-libroj, kiuj aperas en Bulgarujo.

B. Mazurski

Recenzo

Въ всички страни и въ всички срѣди сжествува единъ културенъ обичай, който се е толкова вкоренилъ въ съзнанието на обществото, щото е станалъ нѣщо като неписанъ законъ. Този обичай се състои въ следното: всѣки авторъ или издатель на новоизлѣзла книга праща по единъ или два екземпляра отъ нея на всички редакции на вестници, списания и пр., на културни институти, както и на работящи въ съответната областъ люде, които се интересуватъ или могатъ да се интересуватъ отъ съдържанието на новоизлѣзлата книга. На вестниците и списанията се изпращатъ обикновено два екземпляра съ надписъ „За рецензия“, или както други казватъ „За отзивъ“. Тази практика се спазва и отъ есперантиститѣ и то въ много голѣмъ международенъ мащабъ. Въ редакцията на нашето скромно списание „Bulgara Esperantisto“, колкото незначително и да е то, се получаватъ редовно екземпляри отъ новоизлѣзли книги, и то не само отъ Европа, но и отъ Америка, Азия, Австралия, Африка. Пращатъ ни за рецензия отъ всѣкжде, макаръ че ние нѣмаме възможностъ и нужнитѣ сили да извършваме тази тежка и отговорна работа, която по-опитни съидейници въ странство ще извършватъ съ нужната вещина. Ние можемъ и трѣбва да се ограничимъ въ отбелязването на книгитѣ, излѣзли на бѣлѣ свѣтѣ въ границитѣ на нашата страна. За голѣма изненада, обаче, трѣбва да отбележимъ, че въ течението на почти цѣла една година, въ редакцията на „B. E.“ не е постѣпилъ нито единъ екземпляръ отъ новоизлѣзла въ България книга, съ написъ „за рецензия“.

зия". А презъ тази година излъзоха доста много есп. книги въ България. Изглежда, че обичаятъ, който се спазва отъ цѣлъ свѣтъ, за насъ не сществува. Редакцията е склонна да отдаде това неспазване на културнитѣ традиции по-скоро на тѣхното недостатъчно познаване, отколкото на нѣкакво желание да се прокара съответното издание по нѣкакъвъ контрабанденъ начинъ. За да не сществува подобни непрепорчителни предположения у когото и да било, всички български автори или издатели на книги, засѣгащи международния езикъ есперанто, трѣбва редовно да изпращатъ до Ц. К. на Б. Е. Съюзъ два екземпляри отъ съответната книга, съ надисъ „за рецензия“.

Gazeto „FRATECO“

Estas la plej malkara Esperanta gazeto. Ĝi estas lumturo de nova scienco, paco kaj racia vivo.

Abonu ĝin sendante 10 levojn (2 resp. kup.) al Redakcio „Frateco“. Sevlievo, Bulgarujo.

Profitu la okazon!

Ĝis la kongreso redakcio „Frateco“ vendas je malaltaj prezoj la jenajn librojn:

La granda leĝo	7 lv.
La nova homaro	8 „
La nova vivo	8 „
La fortoj en la viva naturo	8 „
Jen la homo (300 pĝ.)	30 „
Levu la virinon!	15 „

Sumojn oni povas sendi per neuzitaj poŝtmarkoj al Redakcio „Frateco“ Sevlievo, Bulgarujo, aŭ poŝtĉek-konto 2201.

DEZIRAS KORESPONDI:

Emil Vagner, razisto, Mostni 99, Horni Heršpice, Ĉeĥoslovakujo — deziras interŝanĝi poŝtmarkojn. Ĉiam respondas.

Salamon Guterman, ul. Kviatka 47, Plock — Polujo deziras korespondi kun bulgaraj gesamideanoj.

Организационни

Въ отговоръ на окръжното № 360 отъ 29. III. 1938 г. на Ц. К. на Б. Е. С., съ което се искаха отъ мѣстнитѣ дружества статистически сведеня за културно-просветната имъ дейность за изтеклия отчетенъ периодъ, се получиха до сега писма отъ:

Соф. Еспер. Д-во
 Д-во „Lumo“ — Търново
 Д-во „Flamo“ — Кюстендилъ
 Д-во „Култура“ — Дупница
 Д-во „Radio“ — Пазарджикъ
 Д-во „Albatro“ — Варна
 Д-во „Vekiĝo“ — Шуменъ
 Д-во „Kulturo“ — Пловдивъ
 Д-во „Espero“ — Плевенъ
 Д-во „Signo de l' espero“ — Асеновградъ

с. Койнаре, Б.-Слатинско.

Изпратенитѣ писма съдържатъ много ценни статистически сведения за живота и дейността на есперантиститѣ въ цѣлата страна, а сщщо така и много ценни идеи, съвети и внушения за бждещето на Б. Е. Съюзъ и на есп. движение у насъ изобщо. Надѣваме се, че въ най-скоро време ще имаме отговоритѣ и на ония дружества, които досега не сж сторили това.

Попово. 5. V. 38. Свикахме събрание снощи, 7:30 ч. вечерята, като си избрахме ново ржководно тѣло: Председателъ: протоиерей Георги Христовъ, подпредс.: Илия Гавриловъ, секретаръ-касиеръ: Николай Соневъ, библиотекаръ: Иванъ Марковъ. Контроленъ съветъ: Маринъ Анабашевъ, Пенчо Д. Бъчваровъ, Вергилъ Марчевъ и т. н. Събранието бѣше добре посетено и всички възприемаха единодушно всичко.

Н. Д. Соневъ

Šumen. Zavod „Kabiĵuk“. La 30 an de Aprilo fermiĝis la kurso por komen-cantoj. Komencis 30 personoj kaj finis — 18. Daŭriga kurso kun 15 partoprenantoj.

Katalogon de esperanto-literaturo, lernolibroj, vortaroj ktp. ĉiu povas ricevi kontraŭ du levojn en poŝtmarkoj de Redakcio „Frateco“, Sevlievo.

LA MEMORON

Plifortigas kaj perfektigas

LAU METODO TRIFOJE PREMITA DE LA PARIZA AKADEMIO

Prof. de mnemoniko, D-ro D. FAJNŜTEJN, VILNO

(Pollando) Zawalna № 15

Dank' al tiu ĉi metodo, bazita sur leĝoj de psikologio, fiziologio kaj pedagogio, *la memoro* restariĝas ĉe tiuj personoj, kiuj ĝin perdis, pliboniĝas ĉe tiuj kiuj havas malbonan kaj perfektigas ĉe tiuj, kiuj havas bonan; samtempe malaperas *la distriteco* kaj *maldiligenteco*, fortiĝas *la volo* kaj pliboniĝas *ĉiuj psikaj kapabloj* (influante pozitive la karakteron kaj la nervan sistemon) ĉe personoj ĉiuaĝaj, komencante de infanoj ĝis grizhara maljuneco.

Samtempe kun la ĝenerala memorfortigo, miaj specialaj ekzercoj helpas al facila memorado de ĉia scienca materialo.

Post fino de mia plena mnemonika kurso, ĉiu sen escepto tortigas kaj disvolvigas sian memoron ĝis tia grado, ke ili estas en stato jam post unu- kaj dufoja tralegado de ia ajn materialo ne nur tiuj ripeti ĝin en rekta kaj inversa ordo parkere, sed ankaŭ, kio plej gravas, ĉion ellernitan konservi en la memoro por ĉiam.

Postulu senpage detalajn prospektojn de la perkoresponda memorfortiga kurso en Esperanto kaj naciaj lingvoj laŭ adreso:

MNEMONIKA INSTITUTO de Prof. D-ro D. FAJNŜTEIN, VILNO
Pollando, Zawalna № 15.

La verkaro de D-ro Zamenhov

Estas la fundamento de nia lingvo kaj de nia movado

Ĉiu esperantisto devas posedi kaj legi tiujn verkojn.

Verkoj fundamentaj:

Fundamento de Esperanto
Fundamenta Krestomatio
Lingvaj respondoj
Proverbero Esperanta
Originala verkaro

Verkoj literaturaj:

La Biblio
Hamleto
Marta
La Revizoro
La Rabistoj
Georgo Dandin
Ifigenio en Taŭrido
La rabeno da Baĥaraĥ
Fabeloj de Andersen
Batalo de l' vivo

„Bulgara Esperantisto“ — organo
de la Bulgara Esperantista Asocio.

Adreso: strato Alabin № 50. Sofio.

Bulgarujo. Poŝtĉekkonto: 1133

Jarabono: Enlande — 20 bul. levoj,
Eksterlande — 2 sv. fr., 4 respondkuponoj
aŭ egalvaloro, Anoncoj: 1 kv. cm. — 1 levon.